



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 31^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k116/k116.html>

Hispanio funebras kaj doloras pro siaj mortintoj



Mojoseco kaj muziko - Muzaiko



S^o Simon diras kaj kontraŭdiras registarajn novaĵojn

N^o 116^a

Julio 2020

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj
(HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

**Pri la enhavo de la artikoloj
respondecas ties aŭtoroj, ne
la redakcio.**

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.

Enhavo

Redaktore: Nova epoko3

Politiko: Prezidento efika.....4

Hispanio funebras.....9

Kien vi iras, Inesin'?...10

Pri la Majesto de Reĝo Johan' Karl'...12

Timo paroli.....17

Recenzo: Imperiestra horlogisto. 20

Movado: Mortis 107jara e-isto....21

Mojesece kaj muziko.....16

Literaturo:

Sanigaj murdoj: 2 Komenco....22

La Faraono, ĉ. 65^a.....28

Kovrilo: Dum la pasinta manifestacio, la 8^{an} de marto, manifestaciantino portis riveligan afiŝon: **Masklismo murdas pli ol Kronviruso!**

Fernando Simon', proparolanto de la Registaro Hispana, asertis, ke Kronviruso ne estis danĝero je februaro 2020. Ambaŭ ili ŝajnas dramatike eraraj.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Konto **ES62 2038 3123 4260 003 22715**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.
Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.



Nesubskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Nova epoko

Denove ni venas monatotrie antaŭ vin, leganton, kiel ni diris lastan redaktoran artikolon. La kaŭzojn mi jam komentis, kaj estas ĉefe ekonomiaj, pli ol prilaboraj. Por mi estas plezuro redakti ĉi tiun bultenon monate, sed mi komprenas, ke la kosto estas neeltenebla por la poŝo de anoj de HALE, kiuj estas niaj solaj apogantoj.

Sed ne pro tio mi renoncas kontakti vin pli ofte ol antaŭe. La eksperimento pri monata apero estis inda, laŭ mi, kaj ne sen korpezo mi ĉesis ĝin pro la kialoj jam pridiskutita, sed tio ne malebligos, ke ofte aperos novaj artikoloj en nia TTT-paĝaro. La situacio en Hispanio kaj en la mondo, ĉefe en la laborista medio, estas grava kaj dinamisma, kaj pro tio, endas, ke ni diskutu komunajn aferojn pli ofte ol monatotrie. Tio signifas, tamen, ke kelkaj artikoloj perdos aktualecon je la momento, kiam la surpapera versio de **Kajeroj el la Sudo** aperos, kaj pro tio ili estos malaperigitaj aŭ resumitaj en samsekcian diĝeston.

Je la momento, kiam mi verkas ĉi tion ni jam suferas la kvinan semajnon kvarentenan, kaj la novaĵoj ne estas tre esperigaj. Bedaŭrinde la nombro da mortintoj kreskas kaj kreskas (pli ol 18000 nun), sed tamen tiuj mortintoj estas nevideblaj en amaskomunikiloj, kvazaŭ ili ne gravas. Mi memoras, ke dum la pandemio pri Ébola, estis plej fama hundo en Hispanio, Excalibur, la sola mortinto en nia lando pro tiu epidemio. Sed 18 000 homoj ŝajnas, ke estas malpli gravaj por ni, komunaj civitanoj, kies sola devo estas resti hejme kaj pasigi la tempon. Kaj tio starigas gravajn demandojn: kion registaroj kaj aliaj iuj faras dum ni kaŝas hejme? Kio okazas en la mondo? Ĉu estas mensogo mondorĥestrita, kaj ne estas mortintoj, kaj pro tio oni nur vidis kelkajn ĉerkojn? Oni pridiskutis la aferon ĉe sociala interreto, kaj mi povas atesti, ke la sola hospitalo, kiun mi vizitis, estis sufiĉe malplena...

Pri nia magazino, ŝokis min scii, ke kelkaj samideanoj ne scias, ke ĝi senpaŭze aperas de sia ekesto. Kaj daŭre mi aperigos ĝin ĝis kiam alia samideano prenos la taskon daŭrigi ĝin. Se oni dubas, oni demandu al kajeroj@gmail.com

Elkore,

*Jesuo,
redaktoro*

Prezidento efika

Antaŭ pli ol dekkvin tagoj nia Prezidanto proakcidenta sendis nin ĉiujn hejmen kiel premion permesi al li fari aferojn malbone. Li primokis nin, kaj efike, kiam li diris, ke li deziras eloficigi Marjanon Raĥojn cele al alvoko pri balotado tuja kaj povi havi Prezidenton decan gvidante la landon. Sed poste li ekĝuis la prezidentan aviadilon, Falkon', kaj aliajn aferojn, post aĉeti novan matracon por sia lito ĉe Palaco de Monkloa, li decidis, ke tio ja estas vivo, kaj restis presidente ĝis kiam ni sukcesos forpeli lin, se ni kuraĝas fari tion.

Sed vidante, ke la primoko komenca sukcesis, li decidis resti, eĉ se li devos alianci al Diablo. Dekomence li diris, ke povus bone dormi nek li nek la ceteraj hispanoj se li alinaciĝus al PODEMOS, sed poste li al kutimiĝis al la ideo, kaj li decidis, ke ne estas tiom malbone la afero havi registaron koalician maldekstran, ĉar vere tio estas pli bone ol havi neniun. Kaj hispanoj toleras tion.



Sed oni vidu, ke denove plenumas la *Principon de Petro*: **ĉiu funkciulo supreniras en novan poston ĝis kiam li aŭ ŝi atingas sian kulminon pri nekompetenco, en kies posteno li aŭ ŝi restos sensuprenire.** Tio estas same kiel la

Leĝo pri Gravitacio, sed male: ĉiu nekompetentulo estas allogata supren, ĝis sia plafono, same kiel la pomo de Njuton' (kaj ĉiu alia objekto) estas tiritita suben, ĝis kiam ĝi atingas la grundon, kiu estas ties suba limo.

Kaj la malplafono de tiu sinjoro, kiu kredas sin nesenhavebla,

estas la krizo pri KOVID19^o. Kiam ĉiuj diris al li, ke ĝi estas grava, kontaĝa malsano, li prenis tion supraĵe, kaj sukcesis konvinki la popolon, tiom mallerta popolo, kredi, ke oni povas defii senpune Koronaviruson kaj organizi manifestacion kontraŭ masklistoj, kiuj estas pli mortigaj ol KOVID19^o, kiel mi vidis en panelo manifestacia tiun malfeliĉan tagon. Jes, mi konsentas, ke li mem ne faris tiun panelon, sed tiuj homoj ne estintus tie defiante morton, se li malpermesintus tiun manifestacion, kiel li estis konsilita el eksterlando kaj parto de Hispanio, same kiel la eventojn sportajn tiutempajn. Sed ne, oni devis plaĉi sian partneron registaran, ĉar Prezidento devas prezidi la nacion, eĉ li ne povas plenumi ion ajn de sia programo, ĉar programon li ne havas. Lia registara partnero ja havas programon, kaj eĉ se li estas minoritata, li bone ludas pokeron politikan, por kio sufiĉas multe pli ol esti belulo, kiu promesas tion, kion li ne povas doni. La partnero ja povas doni tion, kion li povas, kaj kelkon da kio, dekomence, li ne havas. Kaj por tio ne necesas esti belulo, kio li ne estas, sed li prifajfas. Li ja havas programon kaj kurson.

Tial ni ĉiuj nun estas punitaj. Ni havas pli da mortintoj post 20 tagoj ol Ĉinio post du monatoj. Kompreneble, eĉ ne sciante kion fari, ili ne prenis la problemon supraĵe. Ili estis transpasitaj, jes, ja, sed ii solvis tiun gravan problemon per gravaj rimedoj. Ĉi tie oni primokis la problemon, kaj tio estis kvazaŭ inviti La Parcon al senpaga bufedo. Kaj ĝi ja venis. La Prezidento nun diras al ni, ke ni devas esti kuraĝaj ne eliri surstraten, ĉar se ni elirus, tiu ĉi pesto mortigus nin. Granda kontraŭdiro. Poste li diris, ke ni devas esti punitaj ne eliri dum aliaj dekkvin tagoj. Dume ĉinoj trompas nin per maskoj kaj turkoj forrabas ilin de ni. Kaj kion faras Prezidento de registaro en tiuj kazoj? Ĉu ŝultrumi? Mi ne scias..., tiuj, kiuj voĉdonis por li ne favoris nin, ne.

Se Hispanio estus demokratio, ni ne havus tiun ĉi Prezidenton Registaran. Se ĝi estus totalisma monarĥio, ankaŭ ne. Kaj se ĝi estus monarĥio parlamenta vere, eble oni forpuŝintus lin antaŭ longe. Sed tiuj aferoj ne ekzistas en Hispanio. Ĉi tie ni havas demokration vorte, sed ne fakte. La Kongreso ne povas forpuŝi la Prezidenton Registaran ĉar tiu partio, kiu havas majoritaton en Kongreso estas tiu de la Prezidento. Kaj li regas sian partion. La

afero devus funkcii tute male por ke ni povus diskuti, ĉu ĉi tio estas demokratio, ĉu ne. Nome: deputitoj ne respondecu krom al sia konscienco kaj al la hispana popolo, prifajfante la interesojn de sia partio. Ni elektu la Prezidenton ni mem la popolo, rekte, ne la Kongreso de Deputitoj. Kaj ni ankaŭ elektu juĝistojn rekte, ne la Kongreso, por ke justico fontu rekte el popolo, ne el registaro. Sed oni faras aliel ĉar la registaro ne fidus la popolon. Kaj se la afero estas tiel, kial la popolo devas fidi la registaron? Ĝi estas nia servanto, kaj sekve ni devus povi forpreni ĝin kiam ni vidos, ke ĝi ne plenumas sian laboron. Sed ŝajnas, ke ne estas maniero. Estus maniero, se ni ŝanĝus la Konstitucion, aŭ, eĉ pli bone, ni ansataŭus la Konstitucion per alia nova. Kaj por tio ni bezonas balotadon *ad hoc*.

Sed kiu kolĉenos la katon? Jam ekzistis iam homo, kiu priskribis la problemon, sed oni ne atentis al li. Nun li ne plu estas, li mortis, sed li lasis sian penson skribita. Li estis respublika, kaj pro tio sia plej grava verko titoliĝas **Teorio pura pri respubliko**. Sed ŝajnas al mi, ke ĝi utilas ankaŭ al monarĥio, kiu respektas liberecon kolektivitan por ĉiuj hispanoj. Ĉar neniu naskiĝas klera kaj kapabla regi, sed oni povas lerni fari tion laŭ multe da jaroj, ĉefe se oni pretiĝas cele al tio sian tutan vivon. Prezidento de respubliko ne havas pli da merito ol ricevi pli da voĉdonoj ol la ceteraj kandidatoj, ĉu ili estas pli inteligentaj aŭ estas pli bone pretigitaj ol tiu, kiu venkas, ĉu ne. Por iĝi pordisto lerneja oni devas plenumi minimumajn konojn, sed iĝi Prezidento de lando ne estas tiel: oni postulas de ki, ke li ricevos pli da voĉdonoj ol la aliaj. Kaj tiel iras la afero. Ĉar por voĉdoni oni ankaŭ ne postulas de ni minimuman konstaton. Homoj voĉdonas ĉar ili diras, ke ili *devas voĉdoni*, eĉ se multaj ne scias tion, pri kio temas voĉdono, aŭ kial oni voĉdonu, aŭ kiun oni devas voĉdoni por ke ni ĉiuj pli bonfartos. Sed ne estas malmultaj tiuj, kiuj voĉdonas kontraŭ partio, kiun ili ne volas, ke ĝi venkos. Eĉ se tiu voĉdonata de ili estas nekompetenta, senkapabla kaj perfida al sia nacio. Sed *se li estas unu el tiuj niaj, ne gravas*. Malfeliĉa lando, tiu, en kiu malamo superas emon vivi pace.

Pro tio ni havas la Prezidenton, kiun ni meritas. Ĉar li povas esti senkompetentulo, sed la popolo estas eĉ malpli kompetenta. Pravis Viston' Ĉerĉil, kiam li diris, ke la problemo en Hispanio estas, ke

tiuj, kiuj voĉdonas ne estas tiuj, kiuj legas ĵurnalon, sed tiuj, kiuj purigas sian pugon per ĝi. Kaj tial ni estas nun tie, kie ni estas, kun 13341 mortintoj je la momento, kiam mi verkas tiun ĉi artikolon, kaj trista afero estas, ke estos multaj pli kiam tiu ĉi katastrofo finos. Oni forprenis de ni niajn civilajn rajtojn kaj oni traktas nin kiel krimulojn pro la simpla afero iri promeni surstraten, pro la evidenta senkompetenco de la registaro, gvidata, kio estas eĉ pli malbone, pro la ideologio de la partnero. Kaj oni intencas kulpigi dekstrulojn. La lando falas en ruinon, kaj la Prezidento petas de ni unuiĝon por eliri la krizon. Jes, jes, sed unuiĝo sub kiu? Mi ne fidus pri la decidoj de tiu, kiu venigis tiun ĉi katastrofon. Jes, certas, ke la Registaro ne venigis KOVID19^{on}, sed ĝi povintus preni fruajn decidojn ignorante ideologiajn maniojn. Sed evidentiĝas, ke ideologio gravas pli ol la popola bonfarto, ties civilaj rajtoj kaj eĉ ol nia vivo mem.

Jes, ni vivas en lando tre malklera, kiu ne scias tion, kio konvenas al si. Estas nekredeble, ke la partio, kiu forrabis la oron de la Banko de Hispanio prenis nin finfine al katastrofo ĉar parto de hispanoj, pro malamo al politika opcio preferata de la ceteraj hispanoj, voĉdonis denaskan malvenkiton, kiu alianciĝis al diablo por preni nin en la inferon. Kiam vi vekiĝos, Hispanio?

Kiam ni sukcesos eliri el tiu ĉi problemo, eble ni lernis ion, ke ni ne apartenas al partio, sed la partio apartenas al ni, aŭ ĝi malaperu. Ke ideologioj devas servi la popolon, aŭ ili malaperu. Kaj ne estas ĉielaj kantoj en Ĉi Tia Vivo, kaj ke paradizoj ne ekzistas en tiu ĉi mondo, sed oni ja povas vivi pli bone. Kaj oni vivas pli bone kiam la popolo havas meĥanismojn kontroli la registaron, la ŝtaton kaj la politikan kaston. Kaj ke ni ekzercos tiun povon forpeni la postenon al perfiduloj, kiuj konspiras kontraŭ komuna bonfarto, efektive kaj fulme. Sed, kompreneble, tiu signifus vivi en vera demokratio. Kaj neniu donacos tion al ni. Ĝi ne falos elĉiele, kiel naivuloj kredis, ke ĝi venis post la morto de Franco. Ni ĉiuj devas konstrui ĝin, kiel Ĉerĉil' diris, per sango, ŝvito kaj larmoj. Ĉar komuna bonfarto ja indas. Kaj tio postulas havi Registaran Prezidenton efikan. Dum tio, kion oni nomas demokratio, ni havis sep Prezidentojn, kaj neniu senkulpas sukcesi havigi la bonfartron de la popolo. Ĉiuj eraris grave, kvankam mi devas agnoski, ke la aliaj ne tiom multe. Suárez fuŝis pri la Konstitucio, kiun li mendis

al areto de homoj sen permeso de la popolo. Prezidento Filipino González prenis al ni la rubkontraktojn, nekonitaj en Hispanio antaŭa, poste Aznar venigis la Leĝon de la Neplenkreskulo, tiom fia kiel tiu LOGSEa leĝo de sia antaŭanto, Zapatero mensogis pri ĉio, ĉar li estis renonconte la socialajn konkerojn de sia registaro, ĝis kiam li vidis nin je la limo de tiu ekonomia rekupto, kiun Marjano Raĥoj' evitis, sed li mem ne abolicis iun ajn leĝon teruran de sia antaŭanto, pro kiuj la averaĝa hispana civitano nuna lamas tiom multe pri politika edukado kaj respondeco civitana. Kaj S^o Petro Sanchez agis tre turpe pri la malplej bona krizo homa, kiun



D^{ro} Fernando Simon estis la voĉo de la registaro hispana dum la krizo KRONVID19^a


Hispanio havis en la lastaj jarcentoj, aplikante metodojn de la jarcento 17^a, kvazaŭ medicino kaj sanplibonfartigado progresis nenion dum la lastaj kvar jarcentoj. Temas pri vera tragedio nacia, kiu venkis lin de la komenco. Nun li parolas pri novaj «Paktoj de la Monkloa», kiu aprobos la decidojn, kiujn li ekpensos de nun, kiam la plej bona afero, kiun li povas fari por Hispanio estas demisii kune kun sia tuta registaro, kaj ebligi, ke oni elektos registaron de nacia koncentriĝo kies sola celo estu eliri tiun ĉi krizon homan kaj ekonomian. Kaj poste, kiam la ŝtormo jam pasis, respondecojn politikajn, civilajn kaj kriminalajn oni analizu kaj punu, se endas. Sed oni ĉesu mensogi kaj kulpigi la aliajn. Ĉiu homo faru sian laboron, kaj ni ĉiuj finu bone ĉi tiun militon, plorante niajn mortintojn, kaj protektante la vivulojn.

Ĉar tiel Hispanio estos grava denove. Kaj oni ne forgesu: Hispanio estas ni ĉiuj..

Hispanio funebras

Jam pasis la 50a tago post la proklamado de la plej totalisma leĝo en Hispanio de antaŭ 80 jaroj. Kelkaj hispanoj diras, ke ĝi estis neevitebla, dum kelkaj aliaj defendas, ke ĝi estas troiga. Neniu registaro, eĉ dum la Civila Milito, kuraĝis forpreni niajn civilajn rajtojn tiom dure. Nun estas krimo promeni surstrate kun geamikoj, trinki kafon publike, manĝi en restoracio, viziti viajn gepatrojn, eĉ funebri ilin dece. La registaro kaŝas la realan ciferon de niaj mortintoj, kaj aldone rifuzas honori ilin kun duonhisitan flagon. Ne, ne estas funebro en Hispanio pro la plej granda kvanto da mortintoj en nia historio en pacaj tempoj. Terorismo mortigis ĉirkaŭ mil homojn en Hispanio. KOVID19 jam mortigis, almenaŭ oficiale, 25 613, se ne pli. Tiuj, kiuj indigniĝas pro la malaperintaj mortintoj dum la Intercivitana Milito, nun silentas antaŭ la dekoj da miloj da niaj mortintoj en pacaj tempoj, sub la regado de la plej maldekstrisma registaro de la Reĝimo de 78^a, erare misprenita kiel demokration, kiel pruvas eventoj kiel tiu, kiun mi mencias. Ĉar ĉu tio ĉi estas tio, kion ni hispanoj deziras? Ĉu tion, ke miloj da ni mortas, kaj oni kaŝu la mortintojn? Pli ol dudek mil! Ne, mi opinias, ke ni ne meritas registaron, kiu mistraktas nin tiom malbone. Ĝi profitas la forton de la ŝtato por senmovigi nin hejme sen rajto protesti, ĉar oni monpunas nin per €1 500, kaj poste ministroj diras, ke ili ne havas ion pardonpeti. Aliaj pli valoraj socialistoj ol tiuj ĉi ja pardonpetis kaj pentis, eĉ la lasta Prezidento de la Dua Respubliko, Manuel Azaña, publikigis sian penton pro sia konduto pere de la libroj, kiujn li verkis en ekzilo.

Jes, mi povas akcepti, ke la Registaro de Hispanio estas turpa,



nescia, aŭ malbonŝanca. Sed ne honori mortintojn estas memdifine fia. Ĉu ni meritas tion, voĉdonantoj de PSOE? Eĉ pli: ĉu ni bezonas tion, voĉdonantoj? Ĉar per via voĉdono —eĉ se vi voĉdonas por VOX— vi asertas, ke vi akceptos la rezulton de la balotado. Kaj mi ne povas kompreni, ke vi ne vidas, ke la fakto originanta en la preno de povo de tiu ĉi registaro estas tio, ke vi akceptas la regulojn regantajn tiun ĉi sistemon, kiun vi, voĉdonanto, nomas Demokratio per via voĉdono. Sed en demokratio, la popolo rajtas forpuŝi el povo registaron, kiu ne funkcias efike je la plibonigo de la nacio.

Hodiaŭ Hispanio funebras, sed ne la registaro. Hispanio funebras kaj ploras pro siaj mortintoj, sed ne politikistoj, kiuj reprezentas neniun, krom siajn partiojn. Hispanio funebras, ĉar hispanoj protektas sistemon, kiu favoras politikan klason, sed ne tiujn, kiujn ili diras, ke ili reprezentas. Hodiaŭ Hispanio funebras malgraŭ la iluminitoj, kiuj kreas siajn proprajn mensogojn. Kaj dume la popolo suferas la nekompetenton propran kaj aliesan.

Antaŭ nelonge oni riproĉis al mi publike, ke ne estas klare tio, kion mi proponas, aŭ ke mi proponas nenion. Ververe ne mi devas proponi ion ajn. Mi fingromontras la problemon. Vi, anoj de la pololo, kiu ne scias tion, kion vi faras kiam vi voĉdonas, aŭ tion, kiun vi donas la fidon, kiun ili ne gajnis, estas tiuj, kiuj devas sidi pensi kaj proponi agliniojn, ĉar vi ne kredas, ke donaci blankan ĉekon al neprudentulo estas damaĝa por sano. Ekzistas pli ol dudek kvin mil faktoj, kiuj senvalidigas tiun penson tiom absurdan.

Dume, ĉiu bonvola hispano ploras por Hispanio.

Kien vi iras, Inesin', malgajulin'?

Oni vidas, ke tiu ĉi registaro hispana nuna emas al totalismo pli ol al diktatoreco, kaj al sunbpremado de nia popolo. Kaj nun vi paktas kun ĝi vian jeson al daŭrigado de la Stato de Alarmo. Tamen, vi scias, ke tio estas kontraŭleĝa ago, ĉar la leĝo 4/81, kiu regulas tiun staton, per artikolo 6-2, lasta paragrafo, certigas, ke la Stato de Alarmo nur povas esti plilongigita per esprima rajtigo de la Kongreso de Deputitoj, kiu en ĉi tiu kazo povas establi la amplekson

kaj kondiĉojn de vigleco dum la plilongigo. Notu, ke la dokumento ne diras plilongigoj, sed plilongigo, kaj el tio oni komprenas, ke la Kongreso de Deputitoj, kies ano vi estas, nur povas plilongigi la Staton de Alarmo unu fojon, ne du. Sekve, tiu ago, kiujn vi faris hieraŭ, estas kontraŭleĝa, kaj la sola justa ago por vi estintus forlasi la Kongreson antaŭ voĉdoni. Sed vi restis, kaj voĉdonis favore al ĝi.

Mi kredas, tial, ke hieraŭ vi perfidis la hispanan Konstitucion, kaj la hispanan popolon. Se mi voĉdonus, mi neniam voĉdonus por partio, kiu jam perfidis min kaj mian nacion.

La afero, ke PP, PSOE kaj PODEMOS perfidis ankaŭ nin hispanojn kaj la regantan konstitucion hispanan per progresivaj gradoj da senĵuro, tute ne senkulpigas vin.




Mi neniam laciĝos pri ripetado de tio, ke via partio, same kiel ĉiuj aliaj nunaj hispanaj, ne estas demokratiaj, ĉar neniu el vi reprezentas la civitanojn, sed vin mem kaj viajn privilegiojn kastajn. Tamen je persona nivelo oni povus esperi dececon de vi kaj aliaj politikistoj hispanaj, kiuj erare venis en politikon, kaj pro via profunda ignoranteco pri via metio kredas kaj agas kvazaŭ la profito de la popolo gravas al vi. Verŝajne kelkaj el vi, inter kiuj mi kredis, ke vi estas, kredas, ke vi estas demokratiaj. Sed agoj kiel tiu, kiun vi faris hieraŭ, konvinkas min pri tio, ke viaj naiveco kaj grado da memmensogo estas grandaj. Kion vi faros, se la moŝta Prezidento de Hispanio perfidas la pakton, kiun li subskribis kun vi por ke vi voĉdonos jese al sia pretendo? Ĉu vi denoncos lin antaŭ juĝistoj? Ĉu vi ade plendos pri tio, kion ni ĉiuj scias, ke li ne honoros sian parolon krom se tio favoras al si aŭ al sia partio? Kiel vi sentos iam, kiam vi komprenos, ke vi helpis forpreni niajn liberecojn tiam, kiam ankoraŭ oni eblis halti la ekstreman maldekstron ekregi nian valoran landon?

Nu, Inesin', plaĉus al mi diri, ke mi kompatas vin. Sed ne: mi vere kompatas la hispanan popolon, kiun regas politikistoj kiel vi, kiuj pro sia profunda ignoranteco kondamnas nin al totalismo komunista. Al vi kaj kolegoj de la politika kasto hispana nuna, mi nur povas esprimi malestimon kaj honton.

Pri la majesto de Reĝo Johano Karlo

Leganto, kiu sekvis miajn artikolojn, scias ke mi ja ne nur estas Lrespublikano, sed respublikanto. Tio estas, mi ne nur havas la senton, ke Hispanio apartenas al ĉiu hispanoj, kaj sekve la politika reĝimo kiun ni rajtas havi estas respubliko (la afero de ĉiuj, prodifine), sed ankaŭ, ke mi laboros sukcesi venigi ĝin, je la povo de mia kapablo. Nune, tra tiuj libroj kaj artikoloj, kiujn mi publikigas. Sekve, tiu mia ne estas kazo paroli multe kaj fari nenion.



Respubliko venos, certe. Ĉar en Hispanio neniam ĝi ekzistis, mi jam prikomentis pli ol unufoje pri tio. Ĉar la Unua ne estis respubliko, sed petolaĉado, kiu dum malpli ol du jaroj havis kvin registarojn, unu el kies prezidantoj fuĝis en Francion ĉar li *estis ĝis siaj ovoj el ni ĉiuj*, laŭ lia litera eldiro. La Dua Respubliko estis starigita de tumultoj surstrataj, ne pro referendumo popola, kaj poste ĝi estis okupata de maldekstro, kiu celis eksterigi de la respubliko tiujn, kiuj ne akceptis siajn dogmojn, kaj pro tio la dubindan karakteron respublikan, kiun ĝi havis ĝis 1935 estis perdita pro sia puĉo institucia, tio estas, fare de la registaro mem, kio kondukis en la tragedion de Milito Intercivitana Hispana, pri kiu tiom multe oni mensogis. Pro tio mi ne petas, ke venu la Tria Respubliko, sed la Unua, aŭ pli strikte parolante, La Respubliko, ĉar ni neniam havis ĝin.

Sed en respubliko oni devas respekti la rajtojn de ĉiuj. Oni ne povas agi same al pigrulo, kiu ne volas labori kiel al tiu, kiu laboras tage kaj nokte por plibonigi sian vivon kaj tiun de sia familio. Jes,

mi jam scias, ke estas homoj, kiuj amasigas monon maljuste kaj sennecese, kaj aliaj, kiuj ne havas la ŝancon labori. Nun, en tempoj de KRONVID19^a estas miliono da kuncivitanoj niaj, kiuj perdis sian laborpostenojn, kaj la Registaro ankoraŭ pagis al ili eĉ ne unu eŭron kiel ERTE, malgraŭ siaj promesoj. *Estas facile pafi per pulvo de la Reĝo*, populara diraĵo asertas. Oni povas promesi pri la mono de aliaj, sed venas la horo pagi, kaj okazas, ke ne estas mono. Nun oni ĵus aprobis salajron minimuman vivan por ĉiuj, kaj okazas, ke ankaŭ ne estos mono. Tio, kion ni havas estas ŝuldoj, kaj estonto malbonaŭgura, kiu devigos kolozan kreskon da impostoj. Ĉar, spite al tio, kion kredas kompatindaj malsanuloj pri ideologio, mono ne aperas pro spontana generado, sed oni devas generi ĝin per laboro ĉiutaga, kaj la kofroj de la Ŝtato nutras sin pere de impostoj, kiujn oni povas pagi. Sed se oni malprenas laborpostenon de honesta homo, kaj poste oni donas al li aŭ ŝi minimuman salajron sen devigo trovi laborpostenon en minimuman kvanton da tempo, oni kreas pigrulon, kiu, kiam la Ŝtaton ne plu povos helpi, ĉar ne estas mono por ĉiuj, ne plu volos aŭ povos labori. Ĉu tion volas la Registaro de Hispanio? Vi respondu al mi, ĉar mi ne havas klaran respondon pri tio...

En Hispanio ekzistas monarĥio de ĝia naskiĝo. Vere, en la jaroj 507^a visigotoj kreis Hispanion, kaj nia unua reĝo estis Ĥesalejko. Poste, du jarcentoj poste venis muslimoj pro la perfido de grafo visigota, Don Ĥuljan', kaj necesis oni 781 jarojn rejekti ilin (de la komenco de ilia invado ĝis la fino de la forpuŝo, tio estas, de la Batalo apud rivero Gŭadalet' ĝis la Alpreno de Granada), kaj la reglandoj de Kastiljo kaj Aragon' estis unuigitaj je la personoj de la Gereĝoj Katolikaj, kvankam ĝis kiam venis la reĝo Karlo I^a Hispanio ne estis unuigita plene kaj rajte kaj fakte. Kaj de tiam tio ĉi estis monarĥio ĝis la jaroj 1873^a, sed la jaron sekvintan oni rehavis ĝin, kaj poste, je la sekvinta jarcento, je 1931 kaj post intercivitana milito kaj diktatoreco, 47 jarojn poste oni rehavis la monarĥion denove. Tio estas, mil kvincent tri (1503) jaroj da monarĥio kontraŭ dek (10) da respubliko. Ne malbone, ĉu ne? Kion faris gereĝoj bone, kion respublikanoj ne povis fari? Eble la unua traktis ĉiujn hispanojn same. Jes, same bone aŭ same malbone, sed ili ne diferencigis inter hispanoj. Sed tiuj respublikanoj de la nomita Unua dediĉis sin al aferoj, kiuj neniel rilatis al solvado de tiuj problemoj, kiujn hispanoj havis, kaj tiuj de

la Dua dediĉis sian laboron al persekutado de la duono de hispanoj, kiuj ne opiniis same kiel ili. Tial mi revas pri Respubliko, kiu traktos nin ĉiujn same, riĉulojn kaj malriĉulojn, dekstrulojn kaj maldekstrulojn, religiulojn kaj ateistojn, muslimojn kaj katolikojn, samseksemulojn kaj aliseksemulojn, virojn kaj virinojn, voĉdonulojn kaj nevoĉdonulojn (ĉu sindetenantoj kaj sindetenuloj. Tio estas, samaj rajtoj por ĉiuj, kiuj ne estas egalaj.

Sed monarĥio, dece estas agnoski ĝin, baziĝas sur persono, la Reĝo, kiu elstaras super la aliaj homoj. Jam diris Zorrilla: *De la reĝo malsupren, neniu*. Justeco fontas el Reĝo, kaj publikaj servoj zorgas civitanojn nome de la Reĝo. Tiel oni faras en Unuiĝinta Regno de Britujo kaj Nordirlando kaj en aliaj landoj kie estas monarĥio, kie interkrampe estas pli da demokratio ol en Hispanio, kaj senfine pli ol en tiuj du respublikoj supozeblaj, kiujn ni suferis laŭ nia historio.

Kaj tio irigas nin al la kazo de la Reĝo Don' Johano Karlo (tio pri la Unua estas kiĉo natura al ignorantoj, kiuj ne scias, ke neniam estis alia reĝo nomumita Don Johano Karlo, kaj sekve ne eblas aldoni 1an diferencigi lin el la 2^a kaj sekvaj), kiun oni volas enketi ĉu li deliktis. Nu, se justecon oni faras nome de la Reĝo, ne eblas paroli ĉu la Reĝo deliktis, ĉu vi ne opinias tiel? Sed li ne plu estas funkcia Reĝo, vere. Nun estas Don' Filipo 6^a (tiu ĉi ja necesas nombron, ĉar ĝis la nuna Reĝo estis aliaj kvin, kiuj portis tiun nomon) prezidante la Hispanan Ŝtaton, kaj la Reĝo Don' Johano Karlo estas emerita, tamen Reĝo. Jes ja, gesinjoroj, li retenas la kvaliton reĝan, ĉu li estas emerita, ĉu ne. Kaj la Hispana Konstitucio de 1978 ne diferencigas inter emerita kaj funkcia kiam ĝi diras, ke la persono de la Reĝo estas neimputebla. Sekve, mi deduktas, la Reĝo Don' Johano Karlo daŭre senimputeblas. Geakuzistoj povas enketi ĉion ajn, kion ili volaĉas, sed mi timas, ke ili ne povos preni lin al hispana tribunalo pro io ajn, ĉu ĝi pruveblas, ĉu ne. Mi dubas ĉu oni povos kunvoki lin kiel atestanton..., sed bone, mi ne estas juristo, kaj pri tio mi povas erari, kompreneble. Kaj ĉar mi ĵus pruvis, ke daŭrigi tiun persekutadon estas senutila kaj malŝparado pri publika mono, mi provos analizi la supozeblajn deliktojn de Don' Johano Karlo.

Sur ĉi tiu benita lando estas komisipagoj por ĉio. Bankoj prenas de

ni komisipagojn eĉ por deponi monon en ilin, la bankojn. Ĉu tio estas delikta? Mi suspektas, ke ne, se ne prevarikas la tutaj servoj kaj funkciuloj de la Ŝtato, kies devo estas subpremi delikton. Se oni luas aŭ aĉetas apartamenton, oni devas pagi komision al agento, kiu irigas al ni ĝin. La Ŝtato mem prenas procenton, ĝis 21%, pro ĉiu afero, kiuj ni aĉetas. Oni referencas al ĝi kiel AVI (Aldon' Valora Imposto), sed vere ĝi estas komisipago, senrigarde al nomo. Komercaj agentoj ricevas komisionojn, fakte ili vivas el tio. Jes, malbonŝance, tiu estas la Hispanio de la Komisio, kion fari? La Hispanio de funkciuloj estas nur utopio kaj teoria ekzerco, ĉar se ni ĉiuj estus funkciuloj..., kiu pagus impostojn por nutri la kofrojn de la Ŝtato?

La Reĝo Don' Johano Karlo, kiam li ekzercis kiel Reĝo, iris ĉasi en Botsŭanon kun la Reĝo de Arabio, pro kio li estis akre kritikata ĉar li fotiĝis apud sia araba kolego antaŭ la elefanto, kiun tiu ĉi ĵus ĉasis. Oni silentis tiam tion, kio estis samtempa, kaj kion oni tute ne donis gravecon: li sukcesis decidigi la Reĝon de Arabio elekti la industrion hispanan fari la AVE (rapida trajno) al la Meko. Miliona negoco por nia industrio, multaj laborpostenoj por hispanaj laboristoj, kaj ataŭenpuŝo por hispana teĥnologio. Li ne povus sukcesi se li ne irintus ĉasi kun la Reĝo de Arabio. Sed kritiki estas pli amuze ol agnoski meriton al ĉiu, vere. Kaj pli maldigne, ankaŭ.

Kaj diras mi: en lando de komisionoj estas delikto, ke la Reĝo ricevas ĝin pro granda servo al sia lando? Nu, vi povus diri, ke ne estas eleganta, ke estas avara, ke estas malaprobinda, ke Reĝo devas esti super tiuj aferoj, ktp. Sed ĉu delikto? Eksurprizus min, ke tiel estus. Ŝajnas, konsiderante tion, kion oni diras al mi, ke televido diras, ke ĉi tie leĝojn faras surstrataj homoj, aŭ televidaj prezentistoj. Sed ne: ilin faras la Kongreso de Deputitoj, kaj nedece la Registaro, ĉar Konstitucio akceptas al tiuj la rajton nur sub urĝaj ka eksterordinaraj cirkonstancoj, sed ne pro kutimo, kiel faris ĉiuj prezidantoj kaj ministroj de Hispanio de kiam nia Magana Ĉarto ekregis. Kaj laŭ mia scio, nek la Kongreso de Deputitoj nek la Registaro proklamis ian leĝon, kiu diras, ke la Reĝo, malsame al la aserkuragentoj (ekzemple) ne povas ricevi komision pro sia laboro, aldone al sia regula salajro.

Tion, kion mi petas, estas forgesi ni ĉiuj pri tiu supozebla komisio, kiun la emerita Reĝo prenis, kaj enketi pri tiuj, kiujn eble ricevas deputitoj,

prezidantoj kaj konsilistoj aŭtonomaj, urbestroj kaj magistratanoj, kiuj ne havas senimputeblecon, kvankam ili ja zorgis ricevi privilegion juran ne esti juĝata de normala juĝisto.

Sed, nu, enketu pri ili alta tribunalo kompetenta je ĉiu kazo. Tiel ni ĉiuj estus trankvilaj sciante, ke ĉiuj niaj politikistoj, kiuj ricevas komisiojn pro io ajn estos punataj pro trafiko de influo, tio estas, fari favorojn politikajn ŝanĝe al profito por si mem aŭ siaj partioj politikaj (ne necese monajn), kaj eble ni ekkonstatos, ke la supozebla delikto de Reĝo Don' Johano Karlo ne estis prevariko, ĉar la profito, kion ili ekhavis estis por la hispana popolo, ties

industrio kaj teĥnologio, apud kio la kvanto de la supozebla komisio estas sengrava. Pro tio la Reĝo Patro povas ignori, de sia alta majesto, la paroladon de malamo kiu persekutas lin de kelkaj semajnoj.

Ĉar se tiu parolado de malamo kontraŭ la Reĝo estas la tendenco de supozebla Tria Respubliko, mi bedaŭras ege, ke mi ne povas krei Vivu Respubliko..., pro tordema. La delikto de malamo ekzistas, sed ŝajnas, ke maldekstro havas buleon malami publike homojn, eĉ sian Reĝon... Se faktoj ne dementos min, kompreneble.

Vi fartu bone.

Movado


Mojoseco kaj muziko - Muzaiko

Tiel sonas la ĵinglo de la 9-jaraĝa retradio-kanalo Muzaiko (www.muzaiko.info), kaj ĝi ĝuste esprimas, kion Muzaiko elsendas tagnocte: mojosecon: programerojn en Esperanto el la tuta mondo kaj Esperantan muzikon. Ĝi estas ne nur taŭga por fluparolantoj de Esperanto, sed ankaŭ por komencantoj, por alkitimiĝi al la lingvo kaj por konatiĝi kun la diversa Esperanta muzik-kulturo.

Por krei ĝin volontule kunlaboras multaj Esperanto-parolantoj, ĉu rekte kontribuante al Muzaiko aŭ konsentante ke ilia jam kreita elsendo estu ankaŭ elsendita en Muzaiko. Tiel vi ricevas kaj povas aŭskulti diversan Esperantan enhavon.

Aldone al aŭskultado, vi ankaŭ povas kune krei la retradio-kanalon Muzaiko! Ĉu per helpado en la administrado, ĉu per komputilaj

lertoj, ĉu kreante intervjuojn, ĉu muntante programerojn por Muzaiko. La efikon de via laboro ĝuos homoj el la tuta mondo (blue: landoj de kie oni aŭskultis Muzaikon



inter la 1-a januaro kaj la 1-a de aprilo 2020, ju pli blua, des pli da aŭskultantoj):

Ĉu vi ŝatus kontribui al tiu unika Esperanto-kulturaĵo? Vi povas tion fari, skribu al info ĉe [muzaiko.info](http://www.muzaiko.info). Por ĝui, aŭskulti Muzaikon vizitu ties retejon ĉe www.muzaiko.info

Mojoseco kaj muziko: Muzaiko!

Timo paroli

Multaj homoj timas paroli pri politiko. Ĉar ili devus pridemandi sin multajn aferojn, inter ili tiujn, kiuj favoras al si mem rekte. Kiel, ekzemple, subvenciojn, kiujn ili ricevas por fari filmojn. Mi kredas, ke subvencioj estas fraŭdo: la registaro ne devus povi disdoni monon al nesciuloj, kiuj ne regas sian metion tiel, ke ili ne eblas produkti filmon, kiu interesas al publiko sufiĉe por plenigi kinoteatron. La registaro disipas la monon, kiun ĝi prenas el niaj poŝoj perforte ĉiun jaron per impostoj. Kaj poste ĝi disipas ĝin financante filmojn kaj aliajn aferojn. Se filmo estas malbona, ĝi malsukcesu kaj ties produktistoj bankrotu, same kiel okazas al aliaj entreprenoj: se oni ne scias administri bone, ĝi malaperu.

Do, kiel oni malebligas tion? Laŭ mi, ne plu voĉdonante registarojn, kiuj volas altrudi al ni sian ideologion, anstataŭ fari sian laboron, kiu estas solvi la problemojn de la nacio. Ili starigis sin kiel garantiantojn de demokratio, je kiu ili ne kredas. Kaj ili ne kreas pri ĝi ĉar deputitajn listojn oni faras ene de politika partio, kaj ĝis nun mi ne vidis, ke ili inkluzivas homon, kiu ne ĵuris fidelecon al ties ideologio. Ne, sinjoroj, demokratio estas alia afero. Demokratio estas, ke mi povos voĉdoni por kandidato, kiun mi konas persone, kaj se mi dubas, aŭ se mi ne konas lin aŭ ŝin persone kaj ne konstatis, ke temas pri honesta homo, kiu batalos por miaj rajtoj, mi komprenos, ke honesta kaj solidara ago al ĉiuj aliaj civitanoj estas ne voĉdoni. Voĉdoni sub la nunaj cirkonstancoj estas doni ĉekon blankan al partio por ke ĝi faros tion, kion volos ties gvidanto. Kaj tio ne estas demokratio, sed diktatoreco,



je la plej bona kazo, aŭ —kiel en la nuna kazo de Hispanio —totalismo.

Mi sincere kredas, ke rifuzi paroli pri politiko «por ne dikuti» estas simptomo de granda nematureco. Oni parolas pri politiko kvazaŭ oni parolas pri futbalo: tiuj miaj estas plej bonaj sengrave al tio, kion vi diros. Sed ĉu plejbonas Rojalo Madrido ĉu Barcelono ne tuŝas mian poŝon aŭ vivo mia, dum ne esti objektiva kiam oni informiĝas pri politiko kaj poste pri tio, kiun oni voĉdonu aŭ tute ne voĉdoni, estas io, kio povas kosti al ni la vivon. Kaj sekve, rifuzi paroli pri politiko konservi ŝajnan afablecon estas memmortiga je la momento nuna, kiam partioj plej voĉdonitaj por ĝeni la malulojn gvidas nin en ruinon kaj eble morton.

Sed jen tiu lando, kiun ni havas, tiu de eternaj rabaj infanoj, kiuj kredas, ke ĝeni kontraŭulojn alportos al ili propran avantaĝon, ĉar ili ne komprenas, ke ni ĉiuj estas en la sama ŝipo...

Ne, ne malsolidaras tiuj, Interparoladokiuj bojkotas enfermadon, sed tiuj, kiuj voĉdonas por ĝeni proksimulon, ignorante, ke ĉiuj el ni estas la proksimuloj de niaj proksimuloj...

Kaj se oni ne komprenas politikon, oni lernu. Post ĉio, tio, kion oni scias pri futbalo oni ne lernis en lernejo aŭ kleriga institucio. Sed politiko tuŝas nin pli plene, malgraŭ tio, ke oni

timu lerni el tiuj, kiuj scias pli pri ĝi. Jen kiel vi lernas per parolado al homoj, kiuj komprenas. Sed estas eraro paroli pri ideologio. Ĉiu havu sian propran, sed la grava afero ne temas nur pri ideologio, sed pri solvo de specifaj problemoj, ekzemple la bilanco de pagoj, la reganta moralo aŭ la administrado de KROVID19^a, ofte nomata «la Kronviruso».

Ĉi tiu registaro ne distingis sin faro de bonaj aferoj, kaj ĉar ĝi hontas pri la evidento, ĝi kulpigas (aŭ respondigas, kio estas same) komitaton de dek homoj, kies identecojn ĝi ne malkaŝas «tiel ke oni ne premu ilin»



pri ties decidoj.

Sed ĉi tiu alproksimiĝo ne decas, ĉar tiuj decidoj influas nin ĉiujn pri nia ĉiutaga vivo, pri nia laboro kaj pri ĉu niaj familioj povas manĝi ĉu ne. La registaro eniras en niajn ekonomiojn, kaj poste malŝparas monon per subvencioj al grupoj ideologie proksimaj al si, sed kiuj havas nenion komunan al nia bonstato tiel, kiel feminismaj aŭ aliaj specoj de asocioj, kiuj sanktigas problemojn, kiuj ne influas nin tiel. Se ĉi tiu registaro estus demokratia, aŭ respektus la civitanon, ĝi sentus sin respondeca antaŭ ni, kaj anstataŭ «ĉasi trompojn», ĝi ĉiam dirus al ni la veron, efike alprenante siajn erarojn. Ĉar preni eraron sur sin ne estas diri, ke oni faris eraron —kion fakte la registaro de Hispanio ankoraŭ ne konfesis—, sed preni ĉiujn mezurojn por eviti fari tiun eraron denove. Kiel, ekzemple, anstataŭigi la proparolanton, kiu certigis al ni, ke la Kronviruso ne estas danĝero por la hispanoj, kaj ke aperos nur unu aŭ du infektoj, kiuj estos kontrolataj komplete kaj efike. Kiel anstataŭigi la ministrinon, kiu diris, ke infanoj povas eliri nur al evidentaj fontoj de infekto, apotekoj kaj superbazaroj. Ĉu?

Sed se veras, ke la registaro, kiun ni suferas, konservas iom da patriotismo aŭ respondeco, la sola afero, kiun ili povas fari estas solviĝi kaj ebligi, ke elektoj estos subite alvokataj.

Sed ili ne tion faros, ĉar averaĝa hispano terurigas paroli pri politiko, por ke ne okazu malbona vibro... Kaj tio, laŭ mia opinio, estas signo de malhonesto kaj nerespondeco rilate al aliaj. Feministoj plendas, ke okazis mil mortoj ĉe manoj de masklistoj. Sed preskaŭ tridek mil homoj jam mortis pro



KROVID19^a. Jam tempo estas por ke ni ĉesu meti la ĉaron antaŭ la ĉevalon. Se la registaro ne funkcias bone, ni starigu alian. Ni petu tion tie, kie ajn ni povos. Ni pruvu, ke krom obei la registaron, ni povas teni ĝin respondeca. Kaj ideologiojn, ĉiuj manĝu sian.

Politiko

La horloĝisto de la Imperiestro

Laŝtan fojon, kiam mi vizitis Toledon, mi trovis en librovendejo linteresan libron pri italo, kiun Imperiestro Karlo 1^a de Hispanio (kaj 5^a de Germanio) trovis en Kremono, kaj duingis kiel sian personan horloĝiston. La afero estis sufiĉe komuna tiutempe, sed la aparta afero pri tiu horloĝisto, estas, ke li aplikis siajn konojn al aliaj aferoj, kaj li sukcesis fari civilajn laborojn inĝenierajn, kiel levi akvon de la rivero Tago al la urgo, pli ol 90 metrojn super la nivelo de la rivero.

La libro ne estas mallonga, certe, sed estas plezuro legi ties 400 paĝojn pri tiu elkora toledano, kiun la Imperiestro konsideris sia *caro amico* (kara amiko). Bedaŭrinde filo de la Imperiestro, Reĝo Filipo 2^a ne amis lin tiumaniere, kaj li ne pagis la laborojn de la horloĝisto, kiu mortis malriĉa kaj mizera.



S-ro Karlo Marks

Se oni vizitas Toledon hodiaŭ, oni certe vidos indan straton La homo de ligno (*Calle El Hombre de Palo*). Laŭ la popola rakonto, Juanelo Turriano faris aŭtomatan pupon homskalan, kiu dankis homojn, kiam oni donis monon al ĝi. Ili du promenis kune laŭ tiu strato, kaj sekve la strato nomiĝis laŭ ĝi. Strange, en tiu ĉi libro oni rakontas sufiĉe longe pri la maŝino, per kiu akvo estis prenita ĝis la Kastelo (Alcázar) de Toledo, sed estas nur unuparagrafa mencio pri tiu homo ligna, kaj ŝajne estis sonĝo, kiun Turriano havis. Mi sciis pri tiu aŭtomato, kaj pro tio min disapontis tio. Sed vere la aliaj elpenaĵoj de Juanelo Turriano ja valoras pli ol tiu hommaŝino, kiu vere nur utilis al ricevo de kelkaj moneroj de tempo al tempo por la majstro.

Se oni deziras legi la libron, ĝi estas trovebla sufiĉe facile en librovendejoj, sed ankaŭ ĉe Amazon: <https://www.amazon.es/dp/8480411236>, kontraŭ €26.

Movado **Mortis la plej aĝa esperantisto el la mondo**

Edúardo Larui estis 107 jaraĝa je la momento, kiam li mortis, la pasintan 27^{an} de aprilo. De kiam li naskiĝis, la 9^{an} de marto de 1913, okazis profundaj ŝangoj kaj en Hispanio kaj en Esperanto. Li konis, do, la monarĥion de Alfonso 13^a, la Duan Respublikon Hispanan, la Intercivitanan Militon, la Diktatorecon de Francisco Franco, kaj la Ŝtaton kun Kelkaj Liberoj por Civitanoj, kiun oni konas nun kiel *Demokration*. Pri nia movado, li konis ties unuajn paŝojn en nia lando, la silenton de esperantistoj dum la unuaj jaroj de la diktatoreco, kaj ties postan rekonon kaj fondiĝon de la Hispana Esperanto Federacio, kaj la diversajn kongresojn organizitajn de ĝi.



Li aŭdis pri Esperanto de junaĝo, kaj lernis ĝin je 1932, de la instruisto Alberto Díaz Chapartegui (pron. ĉapartegi), kaj poste, je 1935 oni elektis lin kiel sekretarion de la Grupo Esperantista de Bilbao, kaj prezidanto de la Komiza Esperanta Grupo, kaj li instruis Esperanton tie ĝis kiam Bilbao konkeris la *malamikoj*, je 1937. Eduardo estis vundita dufoje dum la Intercivitana Milito, kaj tamen li neniam parolis kun malamo pri la alia armeo, kiun li ĉiam mencias kiel *la malamikon*, sed neniam kiel *la faŝistoj* aŭ *frankuloj*, laŭ nia informo. Post la milito li estis enkarcerigita kelkajn monatojn, ĝis kiam li estis liberigata sen ajna ekspliko aŭ juĝo.

Kiam li revenis en sian hejmon, en Bilbao, li komencis novan vivon, kiel simpa vendisto kaj post multaj aliaj postenoj, li iĝis prezidanto de asocio de benzinejoj en Biskajo. Post la milito oni denove permesis la agadon de Esperanto en Hispanio, kaj je 1953 oni elektis lin komitatanon de la Grupo Esperantista de Bilbao. Je 1966 li partoprenis aktive la organizadon de la 27^a Kongreso de Esperanto de HEF kiel sekretario de la Organizanta Komitato de la Kongreso, kiun partoprenis 400 samideanoj. Poste, de 1977 ĝis 1981 li iĝis prezidanto de la grupo de Bilbao, por kiu li daŭre laboris kelan ano kaj instruisto de Esperanto.

De lia emeritiĝo je 1979 li multe laboris por Esperanto kaj partoprenis preskaŭ ĉiujn hispanajn kaj universalajn kongresojn de Esperanto.

Longan vivon li ĝuis, kaj dediĉis al Esperanto pli ol 90 jarojn. Tuta bona ekzemplo por ni esperantistoj. Fojfoje oni rimarkas, ke samideano ne plu estas inter ni, kaj subite ni sentas la emon koni iom pri ili, irintoj, por ke ili ne estos forgesitoj. Ni esperantistoj estas malmultaj, kaj kelkfoje estas diskutoj kaj malamikeco inter ni, kio vere estas kontraŭ la interna ideo de Esperanto. Tiusence Eduardo Larrouy López estis ekzemplo por ni, ĉar post esti vundita je sia piedo kaj je sia femuro (kaj trie kuglo preskaŭ trovis sian koron) en milito, li ne esprimis malamon, kaj eĉ parolante pri la alia flanko de la milito, li neniam uzis tiujn vortojn, hodiaŭe tro ofte aŭskultataj de tiuj, kiuj ne estis en tiu milito, malestimajn kaj eĉ malamikismajn, kiel *faŝistoj*, *frankismaj*, *ekstremdekstruloj*, kaj simile. Vere, tiuj, kiuj ja vidis kuglojn flugi ĉirkaŭ sin parolas pri malkonsentoj per diversa kleo ol hodiaŭaj salonaj revoluciuloj, kiuj neniam mortigis aŭ vidis amikon subite morti proksime de ili pro murdanta pafado.

Pro tio, honoron kaj memoron al nia samideano Eduardo Larui Lopes.

2 Komenco.

Mi sidis en parko legante ĵurnalon tiun matenon majan. Mi eble komentis ion laŭte, pro kutimo, kiun ni homoj, kiuj vivas solaj, akiras tiun kutimon. Mi notis voĉon apud mi:

—Ne koleru, sinjoro. Mi esperas, ke la problemo ne estu tiom malbona.

—Kio?

—Vi ĵus diris *Fek' sur viaj mortintoj!* Mi eltiris, ke ne sur miaj.

Mi rigardis ŝin scivole, plena da honto. Mi supozas, ke mi aspektis tre nervoza. Antaŭ mi estis tre bela blondulino, kun verdaj okuloj. Kaj mi estis stultulo, kiu ne sciis kion diri al ŝi.

—Kion vi legas?

—Ĉu? Ho, jes, tio pri la milito de Bosnio. Ĝi estas vera krimo kontraŭ homaro.

—Jes, vi pravas. Indigninda afero.

—Plej malbone estas, ke ni ĉiuj estas komplicoj: ĉiu bombo, kiun hispana aviadilo ĵetas tien kostas al ni pli ol ok milionojn da pesetoj. Kvardek ok mil okdek eŭrojn ĉiu bombo. Kaj oni ĵetas ĝin tie tri tagojn senpaŭze.

—Ĉu tiom?

—Jes. Mono de sango. Kaj ni faras nenion malebligi tion.

—Nu, vere mi ne sciis.

—Nek vi nek iu ajn. Tiuj politikistoj koruptaj kaj mensogaj aldone senhonte diras, ke Hispanio marŝas bone.


—Nune, Hispanio. Sed Jugoslavio marŝas neniel bone...

—Ne. Jugoslavio ne plu ekzistas.

—Ho, terure. Pensu, ke tio povas iam okazi ĉi tie...

—Pardonu min, se mi timigis cin —mi cidiris ŝin ĉar ŝi estas multe pli juna ol mi.

—Vi estas pasia homo, —ŝi diris, ankoraŭ malgaje.



- Ho, cidiru min, bonvolu. Ne, ci ne kredu. Mi pasiiĝas facile.
—Kiel ci volos. Kiel ci nomiĝas?
—Gervasjo. Kaj ci?
—Mi estas Brendin'.
—Brendin'. Bela ci estas.
—Dankon. Bedaŭrinde mia edzo ne plu diras tiel al mi.
—Ĉu ci edzino?
—Jes.

La konversacio direktiĝis al pli personaj temoj, kaj du horojn poste mi akompanis ŝin hejme. Ŝi invitis min supreniri, sed mi rifuzis antaŭ la ebleco trovi ŝian edzon. Mi scias, ke li estas moderna, liberala homoj, sed mi ne fartas komforte en tiu etoso, en kiu fojfoje oni trovas virojn, kiuj plezuriĝas vidante alian viron ĝuisian edzinon. Ŝi diris, ke li ne estas, sed mi ne fidis ŝin tute, ĉefe pro tio, ke mi ĵus konas ŝin. Ne, mi ne fidis ŝin, kaj mi kredas, ke ankoraŭ mi ne fidas ŝin aŭ iun ajn alian virinon. Jen kutimo, kiun mi konservas de mia tuta vivo, kaj tio ĉiam rezultis bone por mi.

Ĉar mi ne havis gravan aferon fari, mi restis tie, sidante ĉe la kontraŭa trotuaro, sur benko, kiu estas en bushaltejo. Estis unu el tiuj malnovaj benkoj, lignaj, kiiuj estas apud fosto ankaŭ lina, kiu montras la nombrojn de la buslinioj, kiuj haltas tie, kaj ties horarojn. Vere mi ne ofte prenas aŭtobusojn, sed tiuj benkoj utilas multe por ripozoj kaj legi ĵurnalon aŭ libron, kiu neniam mankas al mi. Mia labora historio estas tre simpla, kaj vicas kun senlaborperiodoj. Ses monatojn jare mi sendungiĝas, kaj la aliajn mi laboras kiel remetisto en supermerkato. Ne estas mi sukcesanto en vivo, sed tiu mia estas trankvila kaj estas ornamita per senkomplikaj plezuroj, kiel promeni laŭ mia urbo, kiun fojfoje mi opinias planita por mia persona ĝojo, ĉar mi sentas, ke mi posedas ĝiajn tutan strataron, avenuojn, placojn kaj eĉ benkojn ĉe bushaltejoj. De tiu ĉi, en kiu mi sidas, mi povis vidi la loĝejon de Brendin'. Ŝildita malantaŭ mia ĵurnalo, mi vidis ŝin eliri en la balkonon de la dua etaĝo akvumi siajn plantojn. Ŝi ne vidis min, ŝi ne rigardis en mian direkton, sed se ŝi rigardus, ŝi vidintus nur viron legante sian ĵurnalon, kiu kaŝis lian vizaĝon tute. Post mallonga tempo, ŝi reiris en sian domon. Ĝi estis konstruaĵo

kvaretaĝa kun unu loĝejo je ĉiu flanko de la enirejo de la strukturo sur ĉiu nivelo. Sekve, ŝi vivas en la dua maldekstra ejo, tiu, kiun mi rigardis je mia maldekstro. Tiam venis aŭtobuso de linio 14^a, kaj el ĝi subeniris tri homoj. Unu el ili estas diketa viro, iom pli malalta ol mi, kun mostaĉo kaj sia leda valizeto. Li iris al la konstruo de Brendin', kies pordo englutis lin. Dek minutoj poste, kiam mi jam solvas la antaŭlastan linion de la krucvortenigmo de mia ĵurnalo, mi vidis, ke tiu viro eliras kun seĝo en la blakonon de mia Brendin', kaj eklegas libron.

Do ĉi tiu estas la edzo de tiu belulino, mi diris al mi. Kion ŝi vidis en li? Ĉar tiu viro estis ronda, kun mostaĉo kaj skuiras. Eble li estas bonega amanto. Aŭ tre riĉa.

Ĉu riĉa?, diris mi al mi mem. Se li etus riĉa, ili ne vivus en tiu domo. Ĝi ne estas malriĉa, sed tamen modesta. La fasado bezonas farbadon, kaj ĉe la balkono de la apartamento de Brendin' mankas kelkaj kaheloj. Sed ŝatintus mi vivi en tiu apartamento kaj legi libron en tiu balkono, kaj ke Brendin' portus al mi kafon tian, kian ŝi ĵus portis al li en tiu momento. Ŝi kisis lian angon, kaj li sidvangofrapis ŝin dum ŝi eliras.

Tio memorigis al mi, ke estas tempo por kafo, kio estas, ke mi jam estas preter la horo por manĝi, kaj mi iris miahejmen.

Mi estas fraŭlo denaska. Mi neniam havis kialon ŝanĝi tion, sed eĉ se mi havis, mi ne kredas, ke mi ŝanĝintus mian civilan staton. Se virino ne amas min sufiĉe por ke mi ne devos aĉeti per domo kaj manĝado senpaga por la ceero de ŝia vivo, ŝi ne indas. Sola mi estas plej bone. Ververe kuiru ĉiun tagon ne estas tiom malfacila, kaj purigi..., bone, kiam mi havas monon, mi vokas Sonjinon, purigistinon sendependan, kiu sukcesas lasi ĉion pura kaj brila kontraŭ tridek eŭroj. Kiam mi ne havas mono, mi mem purigas ĉion, kaj eĉ se mi lasas same kiel ŝi, aŭ eĉ pli pura, mi perdas la tutan vesperon, aŭ matenon; kaj mi trovas, ke tio estas ĵeti monon, ĉar mia tempo valoras multe pli ol tio, kion mi pagas al Sonjin'.

Ŝi estas agrabla virino, tre juna kaj serioza. Mi ne ŝatas miksi aferon, do mi neniam demandis al ŝi ion ajn personan, kaj se ŝi demandis al mi, mi respondis per evidentaj ekskuzoj. Estas malfacile trovi bonan purigistinon, kaj amantinon ne estas tiom

malfacile trovi, konsiderante la grandan kvanton da impotentaj aŭ sensentivaj, kiun oni trovas ĉie ajn.

Nesciante tre bone kial, mi revenis al la ejo de Brendin' kelkajn fojojn je diversaj horoj laŭ la tago, ĉiam sidante sur mia benko en tiu haltejo, ĉiam ŝildite de mia ĵurnalo. Tie mi pasigis kelkajn horojn ĉiutage, ĉiam je malsama horo. Matenon, je la sepa horo, mi vidis la edzon eliri kaj sidi ekzakte apud mi. Mi daŭre legis mian ĵurnalon senatente al tio, kion ŝia edzo diris al mi, ĝis la tria aŭ kvara frazo:.

—Ŝajnas, ke ĝi malfruas hodiaŭ. Mia dio, mi malfruos por laboro! Pardonu, ĉu vi havas bonan horon? Pardonu, amiko.

—He? Kio? Ho, pardonu. Bonan tagon Mi ne aŭdis vin. Diru al mi, bonvolu

—Ho, ne, vi legis vian ĵurnalon. Ne, pardonu, ke mi ĝenas vin. Mi demandis pri la horo. Ĉu vi havas la bonan horon?

—Pardonpetas mi. Mi ne uzas horloĝon.

—Ha... —diris li, senkomprenante. Kiel oni povas vivi sen scii pri tio, kiu horo estas?, li devis pensi.

—Gervasjo. Mia nomo estas Gervasjo Ruperez Antolin', je via servo, sinjoro.

—Tomaso. Mia nomo estas Tomaso Perez Perez, dankon. Ĉu vi prenas la 14an aŭ la 16an?

—Kio?

—La aŭtobuso. Tiu mia esta la 14^a. Ĉi tie haltas nur du liniojn.

—Ho, jes. Mi kutime marŝas ĉien, sed jes, mi uzas la 14an ankaŭ —mi diris decidante tiumomente scii kie tiu homo laboras.

—Ĉu vi iras laborejen?

—Mi ŝatus. Provizore mi estas sendunga.

—Ho, malplaĉas al mi aŭdi tion. Dum tiuj ĉi tempoj krizaj, tiu, kiu havas postenon, havas trezoron.

—Vi pravas, Tomas', —mi diris iom ĝene, ĉar vere mi ja havas laboron, kvankam duonon da jaro mi vivas sen labori, kio estas plej bone.

—Se vi volas, mi povas paroli al la kontraktisto de mia entrepreno, eble estas io por vi.

—Mi dankus, Tomas'. Rigardu, jen aŭtobuso nia.

Certe, tiumomente alvenas numero 14^a, violkolora. La urbodomo-
mistroj havis la bizaran ideon farbi la urbajn busojn tiukolore, kelkaj
homoj diris, ke pro tio, ke ni jam estas en la erao de Orion', kies
koloro estas viola.

Ni eniris la buson, kaj post dekkvin minutoj, Tomas' premis la
butonon por eliri.

—Jes, ankaŭ mi eliras ĉi tien, Tomas'.

Ni eliris la buson kaj mi vidis, ke mia nova amiko eniris konstruon
egan sur kies fasado estas afiŝo, kiu diras «Fontoplumoj Reverso'»,
sur fontoplumo, kiu skribas je la dorso de arba foliego.

Mi daŭrigis mian matenan promenadon, kaj je la deka matene mi
estis en la placo, kie mi konis Brendin'. Mi disfaldis mian ĵurnalon,
kaj plongis en la eventojn, kiuj zorgigas duonon de la mondo, kaj
prifajfigas la alian.

—Saluton, —aŭdis mi apud mi.

Mi mallevis mian ĵurnalon, kaj tie mi trovis tiun paron da verdaj
okuloj, kiuj persekutis miajn songojn.

—Bonan matenon, —respondis mi. —Via vizaĝo estas familiara al
mi..., vi estas...

—Brendin' Gervasjo.

—Diable, vi ja memoras mian nomon.

—Jes. Ĉiun tagon mi venas ĉi tie. Mi sidas kelke da tempo ĝis kiam
oni malfermas la supermerkaton angulan. Ĝi estas la plej
malmultekosta en la kvartalo.

Tio ja veras. Mi laboris tie ĝis kiam mi trovis postenon en alia, kie
oni pagas al mi iom pli bone.

—Ha, do ni koincidis iam.

—Jes. Kompatinde.

—Ĉu kompatinde?

—Jes. Ne plu estas kavaliroj, kiuj akompanas virinon hejme.

—Nu, ne estas tiom malfacile. Vidu, oni malfermas la merkaton. Se
vi volas, mi atendas vin kaj poste akompanos vin hejme.

Dudek minutojn poste mi jam finis legi la ĵurnalon. Mi levis mian rigardon kaj vidis ŝin veni denove.

—Ĉu vi jam havas ĉion?

—Jes, kompreneble.

Ni klaĉis la tutan vojon. Ŝia domo ne estis malproksime. Ŝi edziniĝis antaŭ du jaroj, sed ŝi ne havas infanojn ĉar ŝia edzo ne emis.

—Ĉu via edzo ne praktikas bone tiel?

—Ho, jes, sed malfrue kaj malbone.

—Kion signifas tio?

—Ni seksumas malofte, kaj li zorgas nur pri li mem. Tuj kiam li plezuriĝas, li finas.

—Kaj vi?

—Mi devas elteni, konsoli min mem aparte.

Mi ne diris al ŝi mian opinion, ne dolorigi ŝin. Sed ĉifoje, atingante ŝian domon kaj oferinte ŝi al mi kafon, mi ne rifuzis: mi sciis, ke edzo ankoraŭ ne venos dum horoj, kaj ke ĉiuj najbaroj laboras ekstere, krom stranga oldulo, kiu neniam lasas sian hejmon. La verkisto, rakontis ŝi al mi survoje, estas tre simpatia maljunulo. Li vivas fronte al mia apartamento kaj fojfoje ni vidas unu la alian tra la balkon', sed kutime li estas en sia manĝoĉambro, kie li verkas siajn rakontojn sen najbara ĝeno. Ŝi konis lin tiam, kiam ŝi lasis la ŝlosilon en la seruro, kiam poŝtisto venis, kaj dum ŝi subskribas la liveron, la pordo fermiĝis. Voki sian edzon ne solvus la problemon, ĉar la ŝlosilo estas en la seruro, kaj sekve oni ne povas malfermi de la alia flanko. Sed S-ro German', la verkisto, pasis de sia balkono al tiu ŝia laŭ la fasado, riskante fali kaj morti kaj malfermis la porden de interno. De tiam ili salutis unu la alian elkore, sed li neniam plu venis en ŝian apartamenton.

Nun mi akceptis ŝian kafon kaj konfidojn, kaj iom post iom, senkonscie, ni iĝis geamantoj. Ŝi ne plu amis sian edzon, sed ŝi ne havis alian aferon. Mi ankaŭ havis nenion oferti al ŝi, kaj mi ne farus, eĉ se mi havus, kaj ni du scias tion.

Mi ne plu montris min al Tomas', ĉar mi jam scias kie li laboras, kaj dum iom da tempo, ĉar mi havis nenion fari, mi sekvis lin kiam li eliris sian laborejon. Tial mi lernis, ke li ne reiris rekte al sia hejmo, sed li haltis diskrete en alia, en kiu li restis dum du horoj kelkajn tagojn semajne. Ĉu kromsalajro?

Daŭrigota

Jam la 18-an de Paofi en Egipto ekregis ĥaoso. La vojoj inter Malsupra kaj Supra Egipto estis interrompitaj, la komerco ĉesis, la ŝoseoj estis okupitaj de la regimentoj, kiuj rapidis al la urboj, posedantaj la plej famajn templojn.

Sur la kampoj laboris nur la pastraj kamparanoj. En la bienoj de l' nobeluloj, nomarĥoj, kaj precipe de l' Faraono, la lino ne estis elŝirita, la trifolio ne estis tuŝita, la vinberojn ŝirkolektis neniu. La kamparanoj faris nenion, vagis en bandoj, kantis, manĝis, trinkis kaj minacis al la pastroj aŭ al Fenicianoj.



Monero honore al aŭtoro de La Faraono

En la urboj la butikoj estis fermitaj kaj la senokupaj metiistoj tutajn tagojn diskutis pri la ŝanĝoj en la ŝtato. Ĉi tiu skandala fenomeno ne estis plu novaĵo por Egipto, sed nun ĝi atingis tiel minacan gradon, ke la kolektistoj de l' impostoj, eĉ juĝistoj komencis sin kaŝi; tiom pli, ke la polico tre malsevere agis kontraŭ la trouzoj de la popolo.

Ankoraŭ unu afero meritis atenton: la granda kvanto da nutraĵo kaj vino. En la drinkejoj kaj gastejoj, precipe en la feniciaj, en Memfiso same kiel en la provinco, povis manĝi kaj trinki ĉiu, kiu volis kaj kiam li volis, tre malkare eĉ tute senpage.

Oni diris, ke lia sankteco donas al sia popolo festenon, kiu daŭros tutan monaton.

Kaŭze de la malfaciligo eĉ interrompo de l' interkomunikiĝoj, la urboj ne bone sciis, kio okazas ĉe la najbaroj. Nur la Faraono, kaj ankoraŭ pli bone la pastroj, konis la staton de la lando.

La situacion antaŭ ĉio karakterizis la malkonsento inter Supra aŭ Teba kaj Malsupra aŭ Memfisa Egipto. En Teboj havis la superecon

la partio de l' pastroj, en Memfiso – la Faraono. En Teboj oni diris, ke Ramzes frenezigis kaj volas vendi Egipton al Fenicianoj; en Memfiso oni rakontis, ke la pastroj volas veneni la Faraonon kaj alkonduki Asirianojn en la landon.

La simpla popolo, norde kaj sude, estis altirita al Ramzes per ia instinkto. Sed la popolo estis forte pasiva kaj ŝanceliĝema. Kiam parolis faraona agitanto, la kamparanoj estis pretaj ataki la pastrojn: sed kiam venis procesio, ili falis sur la vizaĝon kaj tremis, aŭskultante la antaŭdirojn pri katastrofoj, kiuj minacis Egipton jam en ĉi tiu monato.

La teruritaj nobeluloj kaj nomarĥoj preskaŭ ĉiuj kunveturis Memfison petegi la Faraonon pri helpo kontraŭ la ribelantaj kamparanoj. Sed ĉar Ramzes XIII rekomendis al ili paciencon, kaj ne mallaŭdis la popolaĉon, la grandaj sinjoroj komencis interkonsiliĝi kun la pastra partio.

Vere estas, ke Herhor ankaŭ silentis, aŭ ankaŭ konsilis al ili paciencon; sed aliaj ĉefpastroj rakontis, ke Ramzes estas freneza kaj malklare komprenigis, ke oni devas forigi lin de la povo.

En Memfiso ambaŭ partioj vagis unu apud la alia. Malpiuloj, kiuj trinkis, bruis, ĵetis koton sur la murojn de l' temploj, eĉ sur la statuojn; kaj piuloj, plejparte maljunuloj kaj virinoj, kiuj preĝis en la stratoj, laŭte antaŭdirante malfeliĉojn kaj petegante la helpon de l' dioj. La malpiuloj ĉiutage faris ian trouzon, inter la piuloj ĉiutage iu malsanulo retrovis la sanon.

Sed stranga afero: ambaŭ partioj, malgraŭ la bolantaj pasioj, ne malutilis, ne atakis unu la alian. La kaŭzo estis, ke ĉiu el ili faris malordon laŭ direkto kaj plano, preparita per la superuloj.

La Faraono, ne kolektinte ankoraŭ ĉiujn regimentojn kaj pruvojn kontraŭ la pastroj, ne donis la signalon al la decida atako kontraŭ la temploj; la pastroj ŝajne atendis ion. Estis tamen videble, ke hodiaŭ ili ne sentas sin plu tiel malfortaj, kiel en la unua tago post la voĉdono de la delegitoj. Ramzes mem komencis mediti, kiam de ĉiuj flankoj oni sciigis al li, ke la pastraj kamparanoj preskaŭ tute ne partoprenas en la malordoj, sed laboras.

"Kion tio signifas?" –demandis la Faraono sin mem. –Ĉu la

nudaj kapoj pensas, ke mi ne kuraĝos ataki la templojn, aŭ ĉu ili havas iajn nekonatajn de mi defendajn rimedojn?"

La 19-an de Paofi la polico konigis al la monarĥo, ke en la lasta nokto la popolo komencis detrui la murojn, ĉirkaŭantajn la templon de Horus.

– Ĉu vi ordonis al ili tion fari..? –demandis la Faraono la ĉefon.

–Ne. Ili ĵetis sin je sia propra impulso...

–Haltigu ilin delikate... haltigu... –diris la sinjoro. –Post kelke da tagoj ili povos fari, kio plaĉos al ili. Sed nun ili ankoraŭ ne agu tro vivege...

Ramzes XIII, kiel militestro kaj venkinto apud Sodaj Lagoj, sciis, ke kiam unu fojon la amasoj iras al la atako, nenio haltigos ilin: ili devas rompi aŭ esti rompitaĵoj. Se la temploj ne defendos sin, la popolaĉo sukcesos preni ilin, sed se ili volos sin defendi..? La popolo forkuros kaj oni devos sendi tien soldatojn; ili estis multenombraj, estas vere, sed ne tiel, kiel estis necese laŭ la kalkuloj de l' Faraono.

Krom tio, Hiram ne revenis ankoraŭ de Pi-Bast kun la leteroj, pruvantaj la perfidon de Herhor kaj Mefres. Kaj pli grave estis, ke la pastroj, partianoj de l' Faraono, devis doni helpon al la armeo ne pli frue, ol la 23-an de Paofi. Kiel do averti ilin en tiom da temploj, tiel malproksimaj unu de alia? Kaj ĉu simpla singardemo ne ordonis eviti rilatojn kun ili, por ne perfidi ilin?

Pro ĉiuj ĉi motivoj Ramzes ne deziris pli fruan atakon de la popolo kontraŭ la temploj.

Tamen malgraŭ la volo de l' Faraono la ekscito kreskis. Apud la templo de Izido oni mortigis kelke da piuloj, kiuj antaŭdiris malfeliĉojn por Egipto, aŭ mirakle retrovis la sanon. Apud la templo de Ptah la popolaĉo sin ĵetis kontraŭ procesio, batis la pastrojn kaj rompitaĵoj la sanktan ŝipeton, en kiu vojaĝis la statuo de l' dio. Preskaŭ samtempe venis kurieroj de la urboj Soĥem kaj Anu kun la sciigo, ke la popolo volas superforte eniri en la templojn, kaj en Ĥeran eĉ faris tion kaj sakrilegis la sanktejon.

Vespere, preskaŭ kaŝante sin, venis en la palacon de lia sankteco deputataro de l' pastroj. La respektindaj pastroj kun ploro falis al la

piedoj de l' estro, petegante, ke li ŝirmu la diojn kaj templojn.

Ĉi tiu tute neatendita okazo plenigis la koron de Ramzes per granda ĝojo kaj ankoraŭ pli granda fiero. Li ordonis al la delegitoj leviĝi kaj favore respondis, ke liaj regimentoj ĉiam estas pretaj defendi la templojn, se nur ili estos tien enkondukitaj.

—Mi ne dubas —diris li —ke la detruantoj mem forkuros, vidante, ke la domoj de l' dioj estas okupitaj de la armeo.

La delegitoj ŝanceliĝis.

—Via sankteco scias —respondis la plej aĝa —ke la armeo ne povas eniri inter la ĉirkaŭbaron de l' temploj... Ni do devas demandi la opinion de l' ĉefpastroj.

—Bone, konsiliĝu —diris la sinjoro. —Mi ne scias fari miraklojn kaj de mia palaco mi ne povas defendi la templojn.

La delegitoj malĝojaj forlasis la Faraonon, kiu post ilia foriro kunvokis privatan konsilan kunvenon. Li estis konvinkita, ke la pastroj submetiĝos al lia volo, kaj tute ne venis al li la penso, ke la delegacio estas ruzo, aranĝita de Herhor, por erarigi lin.

Kiam en la reĝa ĉambro kunvenis la civilaj kaj militaj altranguloj, Ramzes, plena de fiero, ekparolis:

—Mi volis —diris li —nur la 23-an de Paofi okupi la memfisajn templojn... Sed mi opinias, ke pli bone estos fari tion morgaŭ...

—Niaj regimentoj ankoraŭ ne kolektiĝis... —intermetis Tutmozis.

—Kaj ni ne havas la leterojn de Herhor al Asirianoj —aldonis la granda skribisto.

—Ne grave! —respondis la Faraono. —La popolo eksciis morgaŭ, ke Herhor kaj Mefres estas perfiduloj; al la nomarĥoj kaj pastroj ni montros la pruvojn post kelke da tagoj, kiam Hiram revenos de Pi-Bast.

—La nova ordono de via sankteco tre ŝanĝas la antaŭan planon —diris Tutmozis. —Morgaŭ ni ne okupos Labirinton... Kaj se ankaŭ en Memfiso la temploj kuraĝus kontraŭstari, ni ne havas murrompilojn por rompi la pordojn...

—Tutmozis —diris la Faraono —mi povus ne doni klarigojn pri miaj ordonoj... Sed mi volas konvinki vin, ke mia koro pli profunde juĝas la fluon de la okazoj... La popolo —daŭrigis li —jam hodiaŭ

atakas la templojn, morgaŭ ĝi volos penetri en ilin. Se ni ne subtenos ĝin, ĝi estos forpuŝita, kaj en ĉiu okazo post tri tagoj ĝi ne havos plu kuraĝon. Post kelke da tagoj povas pligrandiĝi la nombro de pastraj partianoj inter la popolo... La entuziasmo kaj la timo estas kvazaŭ la vino en kruĉo: ju pli multe oni elverŝas, des pli malmulte restas, kaj nur tiu povas trinki, kiu ĝustatempe alŝovos sian glason. Se do hodiaŭ la popolo estas preta al la atako kaj la malamikoj timigitaj, ni profitu tion, ĉar mi diras al vi, ke la fortuno povas post kelke da tagoj forlasi nin, eĉ sin turni kontraŭ ni...

—La nutraĵo ankaŭ finiĝas —intermetis la trezoristo. —Post tri tagoj la popolaĉo devas reveni al la laboro, ĉar ni ne povos plu nutri ilin senpage...

—Vi vidas..! —diris la Faraono al Tutmozis. —Mi mem ordonis al la ĉefo de la polico, ke li haltigu la popolaĉon. Sed se oni ne povas ĝin deteni, oni devas uzi la movadon. La sperta maristo nek batalas kontraŭ la fluo, nek kontraŭ la vento, sed li permesas al ili, ke ili portu lin en la elektita direkto...

En ĉi tiu momento venis kuriero kun la novaĵo, ke la popolo sin ĵetis kontraŭ la eksterlanduloj. Oni atakis Grekojn, Sirianojn kaj precipe Fenicianojn... Oni rabis multe da butikoj kaj mortigis kelke da homoj.

—Jen estas la pruvo —ekkriis la monarĥo kun indigno —ke oni ne devas dekonduki la amasojn de la montrita vojo..! Morgaŭ la regimentoj estu proksime de la temploj... Kaj ili tuj enmarŝu tien, se la popolo komencos penetri tien, aŭ... se ĝi komencos cedi sub la premo.

Estas vere, ke oni devas ŝirkolekti en la monato Paofi. Sed ĉu ekzistas ĝardenisto, kiu lasus la fruktojn sur la trunketoj, se ili estus maturaj unu monaton pli frue..? Mi repetas: mi volis malfruigi la movadon de la popolaĉo, ĝis kiam niaj preparoj estos finitaj. Sed ĉar oni ne povas nun prokrasti, ni profitu la venton, kiu blovas, kaj ni disetendu la velojn..! Morgaŭ Herhor kaj Mefres devas esti arestitaj kaj alkondukitaj en la palacon. Kun Labirinto ni finos post kelke da tagoj.

La membroj de la kunveno konsentis, ke la decido de l' Faraono estas bona, kaj disiris, admirante lian decidemon kaj saĝon. Eĉ la

generaloj diris, ke pli bone estas profiti la ŝancon ol kolekti la fortojn por la tempo, kiam la okazo forpasos.

Jam estis nokto. Alkuris alia kuriero de Memfiso kun la novaĵo, ke la polico sukcesis ŝirmi la eksterlandulojn. Sed la popolo estas ekscitita, kaj oni ne scias, kion ĝi entreprenos morgaŭ.

De ĉi tiu momento unu kuriero venis post alia. Unuj alportis sciigojn, ke grandaj amasoj de kamparanoj, armitaj per hakiloj kaj bastonegoj, de ĉiuj flankoj rapidas al Memfiso. Aliaj anoncis, ke en la ĉirkaŭaĵo de Peme, Soĥem kaj On la popolo forkuras en la kampojn, kriante, ke morgaŭ estos la fino de l' mondo. Alia kuriero alportis leteron de Hiram, ke li tuj venos. Alia konigis, ke la pastraj regimentoj sekrete marŝas al Memfiso kaj, kio estas pli grava, ke de Supra Egipto iras grandaj taĉmentoj de popolo kaj soldatoj, malamikaj al Fenicianoj kaj eĉ al lia sankteco.

"Antaŭ kiam ili venos – pensis la Faraono – mi jam havos en miaj manoj la ĉefpastrojn kaj eĉ la regimentojn de Nitager... Ili malfruis je kelke, da tagoj..."

Fine oni komunikis, ke en diversaj lokoj la soldatoj kaptis alivestitajn pastrojn, kiuj penis penetri en la palacon de lia sankteco, kredeble kun malbonaj intencoj.

– Oni alkonduku ilin al mi – respondis la Faraono kun rido. – Mi volas vidi tiujn, kiuj kuraĝas havi malbonajn intencojn kontraŭ mi..!

Ĉirkaŭ la noktomezo, la respektinda reĝino Nikotris postulis aŭdiencon de lia sankteco.

La nobla sinjorino estis pala kaj tremanta. Ŝi ordonis al la oficiroj eliri el la reĝa ĉambro kaj restinte sola kun la Faraono, diris plorante:

– Mia filo, mi alportas al vi tre malbonajn antaŭdirojn...

– Mi preferus, reĝino, aŭdi detalajn sciigojn pri la fortoj kaj intencoj de miaj malamikoj...

– Hodiaŭ vespere la statuo de la dia Izido en mia preĝoĉambro deturnis la vizaĝon al la muro, kaj la akvo en la sankta cisterno nigriĝis, kiel sango...

- Tio pruvas – respondis la Faraono – ke en la interno de la palaco ni havas perfidulojn. Sed ili ne estas tre danĝeraj, se ili scias nur malpurigi la akvon kaj turni la statuojn.
- Ĉiuj niaj servistoj – daŭrigis la reĝino – la tuta popolo estas konvinkita, ke se viaj regimentoj penetros en la templojn, granda malfeliĉo falos sur Egipton...
- Pli granda malfeliĉo – diris la sinjoro – estas la trokuraĝo de la pastroj. Enlasitaj de mia eterne vivanta patro en la palacon, ili pensas hodiaŭ, ke ili fariĝis ĝiaj posedantoj... Sed pro dioj, kio mi fine fariĝos ĉe ilia ĉiopoveco..! Kaj ĉu mi ne povas repostuli miajn reĝajn rajtojn..?
- Almenaŭ... almenaŭ – diris la reĝino post pripenso – estu kompatema... Jes, la rajtojn vi devas reakiri, sed ne permesu al viaj soldatoj sakri la sanktejojn kaj ataki la pastrojn... Memoru, ke la dioj favore sendas la ĝojon al Egipto, kaj la pastroj malgraŭ siaj mankoj (kiu ne havas ilin!) faras al la lando grandegajn servojn... Imagu nur, ke se vi malriĉigus kaj dispelus ilin, vi detruus la saĝon, kiu levis nian ŝtaton super la aliajn popolojn...

La Faraono prenis la patripon je ambaŭ manoj, kisis ŝin kaj ridante diris:

- La virinoj ĉiam devas trovi..! Vi, patrino, parolas al mi, kvazaŭ mi estus ĉefo de l' sovaĝaj Hiksosoj, ne la Faraono... Ĉu mi deziras la pereon de l' pastroj..? Ĉu mi malamas ilian saĝon, eĉ tiel senfruktan, kiel la observado de la movoj de l' steloj, kiuj sen ni promenas sur la ĉielo, ne pliriĉigante nin eĉ per unu uteno..? Ne kolerigas min ilia saĝo aŭ pieco, sed la mizero de Egipto, kiu interne malgrasiĝas de l' malsato kaj ekstere timas iajn ajn asiriajn minacojn. La pastroj, malgraŭ la saĝo, ne sole ne volas helpi miajn reĝajn intencojn, sed tute senhonte kontraŭstaras al mi. Permesu do, patrino, al mi konvinki ilin, ke ne ili, sed mi estas la sinjoro de mia heredaĵo. Mi ne scius venĝi al humilaj, sed mi piedpremos la nukojn de l' trobravaj. Ili scias pri tio, sed ne kredas ankoraŭ kaj ne havante realajn fortojn, volas timigi min per antaŭdiro de iu katastrofo. Tio estas ilia lasta armilo kaj ŝirmo... Kiam ili komprenos, ke ne teruras min la timigiloj, ili humiliĝos... kaj tiam eĉ unu ŝtono de iliaj temploj ne falos, ne perdiĝos eĉ unu juvelo de iliaj trezorejoj. Mi konas ilin..! Hodiaŭ ili faras bravajn gestojn, ĉar mi estas malproksime de ili. Sed

kiam mi etendos mian bronzan manon, ili falos sur la vizaĝon kaj la tuta malordo finiĝos per paco kaj ĝenerala prospero.

La reĝino ĉirkaŭprenis la piedojn de l' sinjoro kaj foriris trankviligita, petegante tamen Ramzeson, ke li respektu la diojn kaj estu kompatema al ties servistoj.

Post la foriro de l' patrino la Faraono alvokis Tutmozison.

– Morgaŭ do – diris la sinjoro – miaj soldatoj okupos la templojn. Avertu la kolonelojn, ke mia volo estas, ke la sanktejoj restu netuŝitaj kaj ke neniu levu la manon kontraŭ la pastroj.

– Eĉ kontraŭ Mefres kaj Herhor..? – demandis Tutmozis.

– Eĉ kontraŭ ili – respondis la Faraono. – Ili estos sufiĉe punitaj, kiam forigitaj de la nunaj postenoj ili ekloĝos en la temploj kun saĝuloj por preĝi kaj sen malhelpo studi la saĝon...


– Estos, kiel ordonas via sankteco... kvankam...

Ramzes levis supren la fingron, kiel signon, ke li volas aŭskulti nenian proponon... Poste, por ŝanĝi la temon, li diris kun rideto:

– Ĉu vi memoras, Tutmozis, la manovrojn apud Pi-Bailos..? Du jaroj jam pasis..! Kiam mi koleris en tiu tempo kontraŭ la trouzoj kaj avideco de l' pastroj, ĉu mi povis supozi, ke tiel baldaŭ mi reguligos kun ili la kontojn..? Kaj la malfeliĉa Sara... Kaj mia malgranda filo... Kiel bela li estis..!

Du larmoj ruliĝis sur la vizaĝo de l' Faraono.

– Vere – diris li – se mi ne estus filo de l' dioj, kiuj estas kompatemaj kaj grandanimaj, miaj malamikoj pasigus morgaŭ malfacilajn horojn... Kiom da humiligoj ili kaŭzis al mi... Kiom da fojoj, dank' al ili, la ploro vualis miajn okulojn..!



Kabe,
tradukinto de
La Faraono

Daŭrigota



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels116.pdf>

Numero 116^a - Julio 2020

Ĉu la registaro de Hispanio funebras?



Prezidantino de la Aŭtonoma Komunumo de Madrido vizitas mortejon de ties ĉefurbo, kaj doloras pro tiom da maljunaj vivoj tranĉitaj de KRONVID19^a.

Verŝajne, la Estraro Nacia de Hispanio neniam vizitis ĝin, kaj ne esprimis doloron pro tio. Nun ili diras, ke *jam sufiĉas paroli pri mortintoj.*

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88